# Hispana Esperanto
# GAZETO

**1.ª Jaro** **MAJO 1931** **N-ro. 2**

OFICIALA ORGANO DE
HISPANA ESPERANTO ASOCIO

ORGANO OFICIAL DE LA
ASOCIACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA

*Redakcio kaj Administracio:*
SAGASTA, 10. - MADRID (HISPANUJO)

TIPOGRAFÍA CHULILLA Y ANGEL
Torrecilla del Leal, 17
Teléfono 71926

© Biblioteca Nacional de España

## SECCION DE PROPAGANDA

### RADIO-ESPERANTO

Kiu neniun bezonas?—Neniu.

Kiu alian bezonas?—Ĉiuj.

Dum nia vivo ĉiu homo bezonas la helpon de alia homo, kaj ju pli ni studas kaj progresas, des pli ni bezonas la reciprokan helpon kaj asistadon.

La homa kapableco estas tre limigita, ĉar post la peko de niaj prauloj Adamo kaj Evo, ni ne estas perfektaj.

Pro tio, la homo specialigis siajn studadojn por plibonigi kaj perfektigi sian spertecon, tiel rapide kiel eble, pri tia, kia temo elektita laŭ sia inklino.

Ne ĉiuj ni ĝuas egalan kvanton da Dia graco, tial, estas nefacila laboro kunigi la homan volon; do, *tiom da sentencoj kiom da kapoj*.

Per ĉiuj vojoj oni povas iri Romon, estas vero, sed ĉiuj ni kredas, ke nia vojaĝo estas la plej bona, mallonga kaj komforta. Nia stimulo incitas nin al luktado, por ke niaj kumuloj akompanu nin, vole aŭ nevole.

Iuj konsentans kuniri, sed aliaj ne, ĉar iuj deziras piediri, aliaj glitiri; iuj jen azenrajdas, jen ĉevalrajdas; aliaj veturas en ĉaro, en kaleŝo, sur biciklo, en vagono, en aŭtomobilo; kelkaj preferas navigi, ĉu sur velŝipo, ĉu sur maŝinŝipo; iuj avidas aerveturi en aerostato, aliaj en aeroplano.

Rimarku, kvankam ĉiuj ili celas translokiĝi, tamen la daŭro de la vojaĝoj estas diversa, laŭ uzita metodo.

Sed observu, ke la tempo estas oro, kaj pro tio, kiu perdas tempon, perdas monon.

—Kion ni devas agadi por ŝpari la tempon?

—Rapidigi, akceli la vojaĝon tiel, kiel plej eble.

—Tiam, de nun, ni vojaĝos en aeroplano.

—Bone, sed mi avertas vin, ke tia elektita veturado estas kvazaŭ promenado de formiko, se oni komparas kun tiu, kiun mi konkludas de la jena ekvacio.

$$\lambda = T\,V\,2\pi\sqrt{C\,L}$$

en kiu $\lambda$ estas la longeco de ĉiu paŝo; $T$ estas la tempo kiu daŭras unu paŝo; $V$ estas la rapido de la vojaĝo po 300.000 kilometroj en ĉiu sekundo; $2\pi = 6,18$, rilate de la kruroj al la longeco de la cirklo.

© Biblioteca Nacional de España

kiun ili formigas dum sia oscilado; la faktoroj enradikigitaj estas C= kvanto de la ŝarĝo, kiun ni kunportos, kaj L= inerteco, kiun ni devas venki per potenco.

—Kian klason de veturilo ni uzos do, ĝiaj kvalitoj devas esti preskaŭ spiritaj.

—Preskaŭ, preskaŭ, do, ĝia nomo estas ELEKTRONO, kium ekmovas ĉiutage la radio-dissendantoj.

Nenium mi admonas, kvankam mi sole vojaĝu en elektrono.

Neniel, mi deziras, ke per mia potenco, iuj ĉagrenitaj vojaĝu kune kun mi kontraŭ sia volo.

Ampleksa estas la esperantuja kampo, en kiu, ĉiu esperantisto povas kulturi, laŭ siaj projektoj, kaj atingi la celon, kiun li deziras; do, mi respektas, tiel la malgradetan formikpaŝon, kiel la dissaltadon de la elektrono, ĉar ambaŭ antaŭirigas esperanton, ambaŭ celas progresi, kvankam per liaj diversaj manieroj la resultoj ne estas egalaj.

Konsideru ĉu ni devas danki, kuraĝigi kaj gratuli per p. k. ĉiumonate, la esperantistajn radio-sendantojn de:

R. Narmandie (222 m.) S-ro. Dubuison.—Lille P. T. T. (265 m.) S-ro. Trottin. — Heilsberg (276 m.) S-ro. Staciestro. — Bratislava 278 m.) S-ro. Wanitseh.—Leizig (295 m.) S-ro. Dietterle.—Tallin (296 m.) S-ro. Staciestro.—Breslau (325 m.) S-ro. Staciestro.—Muhlacker (360 m.) D-ro. Vogt.—Alger (364 m.) S-ro. Pinty.—Bern (404 m.) S-ro. Liniger.—Paris P. T. T. (447 m.) S-roj. Rousseau. Cart kaj Iajarte.—Stokolmo (454 m.) S-ro. Staciestro.—Lyon-la-Doua (466 m.) S-ro. Staciestro. Lamgenberg (473 m.) S-ro. Dormans.— Wieno (516 m.) S-ro. Smital.—Huizen (1.071 m.) S-ro. Heilker.— Moskvo (1.304 m.) S-ro. Staciestro.—Kaunas (1.935 m.) S-ro. Kutra.

Krome, ankaŭ, kvankam ne regule, esperantlingve radio-dissendas Nuremberg (238 m.), Odesa (411 m.), Bruselas (512 m.).

Konsideru la gravecon de la radio-dissendado esp. lingve, kaj poste, agadu.

Rimarku, ke guto kaj guto faras maron, en kiu moviĝas fortaj kaj potencaj ondegoj.

FRANCISCO M. RUA

* * *

II

La inmensa mayoría del público, que vive completamente al margen del movimiento esperantista, no puede imaginarse la gran importancia de éste en todo el mundo, ni la transcendencia que tendría en el

© Biblioteca Nacional de España

progreso humano la adopción del Esperanto por todos los Gobiernos, para ser incluído como asignatura obligatoria en los programas del bachillerato, y aun en las escuelas de primera enseñanza, como iniciación de los niños en el problema de las relaciones internacionales de todos los pueblos.

Muy pocos son todavía los hombres que están enterados de esto, y es muy frecuente que, al vernos hojear un periódico en Esperanto, nos pregunten aún: «¡Ah! ¿Pero también se publican periódicos en esa lengua? Yo creía que eso era solamente una cosa teórica.»

Otros, que tuvieron noticias de la existencia del idioma internacional, pero que creyeron que se trataba de un asunto de puro pasatiempo, o de cosa efímera y de las que la Prensa sólo se ocupa durante una corta temporada, preguntan, al ver un libro o periódico esperantista: «¿Y es que todavía existe *eso* del Esperanto? En verdad, creí que era ya cosa olvidada, pues como la Prensa no dice nada de esto...»

Y así vamos comprobando los esperantistas el total desconocimiento que se tiene de nosotros. Es preciso, pues, insistir en recordar, o informar al gran público, que el Esperanto vive de un modo perenne en todo el mundo y que su desaparición es ya imposible, por ser inherente a la vida misma de los pueblos, en sus relaciones internacionales, las cuales, yendo en aumento, como vemos diariamente, han de hacer cada día más necesaria y urgente la adopción de una lengua neutral para la comunicación oral y escrita de los naturales de distintas naciones.

Desde todos los puntos de vista debemos exponer el problema ante aquellos que lo desconozcan, aclarando dudas y hasta discutiendo los conceptos dudosos con quienes tengan conocimiento del asunto y lo crean irrealizable o difícil de realizar. No nos dolerán prendas. Y, si algún lector nos honra con sus objeciones o consultas, tendremos un singular placer en contestarlas en esta misma sección, a fin de que, no sólo a él, sino también a los demás lectores, sirva de algo nuestro trabajo.

Espontáneamente queremos hoy dirigir a quienes nos lean algunos razonamientos encaminados a preparar el terreno y fijar las bases de nuestras sucesivas peroraciones.

Y lo primero en que debemos quedar conformes, el lector y yo, es en si es o no necesario el Esperanto, porque, si resultara que no lo fuera, me ahorraba toda clase de explicaciones.

A mí me parece una herejía el dudar siquiera sobre este punto, y afirmo rotundamente que el Esperanto, como idioma internacional, sólo para entenderse los habitantes de una nación con los de otra de

© Biblioteca Nacional de España

distinta lengua, es hoy muy necesario, en el sentido de auxiliar del progreso, a la manera que lo son el correo, el telégrafo, el ferrocarril, la luz eléctrica, etc.

Pero ya sé que esta afirmación mía no será aceptada universalmente, porque entre los hombres existen ejemplares extraños, cuya misión es opinar contra todos los demás que no piensen como ellos. Así hemos podido leer recientemente que una alta autoridad dijo «que no le importaban las huelgas de los empleados de Comunicaciones, porque, después de todo, nuestros abuelos habían vivido perfectamente sin teléfono ni telégrafo...»

Tenía razón aquel señor, pero con una decisión previa: que se borrara del diccionario la palabra *progreso*. Ahora, si ésta ha de continuar en el léxico de todos los pueblos y reconocemos que la única razón de nuestra existencia es progresar en todos los órdenes, entonces no hay más remedio que confesar que nos hacen falta los citados medios de comunicación, perfeccionándolos, si es posible, hasta el extremo de poder hablar por telegrafía sin hilos, y sin estorbo alguno, con los habitantes de la China, de Persia..., o, más sencillamente, con los de Francia o de Inglaterra.

Pero, ¿cómo nos entenderemos con estos apreciables hermanos de otras naciones, si su idioma no es el nuestro?... Ya surgió la necesidad. Ya tropezamos con el obstáculo de la diversidad de idiomas, y nos encontramos con que, dentro de los adelantos modernos, de poder viajar con enorme rapidez a cualquier punto de la tierra, de poder conferenciar telefónicamente con cualquier extranjero, de entablar relaciones comerciales con él, de ir a buscar trabajo o ilustración a otro país, nos falta el órgano de comprensión, el idioma común, la segunda lengua que todos debíamos poseer, para no encontrarnos como verdaderos mudos ante el hombre que habla diferente idioma del nuestro.

He aquí, en un solo aspecto, la demostración de que es necesaria la implantación de un idioma internacional. Debe introducirse en los programas de todos los estudios preliminares el del Esperanto, medio de difusión de la cultura, de alcances tan insospechados, que aceleraría el progreso en una proporción comparable tan sólo a la invención de la imprenta.

Los que tengáis la paciencia de seguirme veréis claramente la verdad de lo que digo y de tantas otras cosas como hay que exponer sobre este tema.

F. SOLER VALLS

Cáceres.

* * *

© Biblioteca Nacional de España

# IMPORTANCIA DEL ESPERANTO

Cuando el ilustre Zamenhof inventó el Esperanto, puso en práctica uno de los hechos que más debió agradecer la Humanidad, si ésta no hubiera estado saturada de egoísmos y de envidias. En todos los tiempos ha habido ejemplos de ingratitud para aquellos hombres que emplearon toda su vida en trabajos constantes para lograr, por medio de sus enseñanzas e inventos, el bienestar de sus semejantes.

Si el inventor del Esperanto hubiera dedicado sus actividades cerebrales al descubrimiento de algo destructor, o se hubiera distinguido como sanguinario guerrero, sería citado su nombre hasta en las escuelas primarias; sus retratos y estatuas perpetuarían su memoria. Y, sin embargo, ZAMENHOF prestó un gran bien a la Humanidad; quisiéramos haber podido penetrar en las reconditeces de aquel privilegiado cerebro y sorprender los elevados pensamientos que le indujeron a lanzar su lenguaje universal, no único. Han transcurrido algunos años desde que el sabio médico dejó de pertenecer al mundo de los vivos, y desde las eternales mansiones observará con pena la apatía de los más para adoptar un procedimiento que sólo reportaría beneficios, evitando muchas luchas y discordias.

La enseñanza obligatoria del Esperanto debe llegar a ser un hecho, puesto que reportaría inmensas ventajas a la Humanidad, y, para conseguirlo, todos debemos emplear cuantos medios se presenten a nuestro alcance.

Hoy día, que, en virtud de los adelantos que la ciencia proporciona, tanto se ha despertado en el hombre el deseo de saber; que recorre todos los países escuchando conversaciones, discursos y noticias en las más variadas lenguas, haciendo uso de la Radio; cuando todas las naciones procuran fomentar el turismo como base de riqueza e ilustración, ¿cabría nada más acertado que el aprendizaje de una lengua auxiliar que se hablara en todas las partes del mundo? ¿No reportaría incalculables beneficios, social, económica y políticamente?

Hace pocos días se recibió en un apartado rincón de Castilla una carta escrita en Esperanto procedente de Checoeslovaquia, y su traducción era escuchada con emoción y alegría al ver que, de tan remotas tierras, y en lengua tan distinta, bastaba la sencillez del Esperanto para poderse comunicar noticias gratas.

No hay procedimiento más práctico y útil para cultivar una amistad perdurable, que la recíproca y frecuente correspondencia; probadlo escribiendo, por ejemplo, a un japonés, y terminaréis por establecer la más efusiva simpatía; haced igual con un ruso, un inglés o un alemán, y nacerá una corriente de afectos y cariños que será difícil romper.

© Biblioteca Nacional de España

Pues bien: esto no podrá conseguirse más que cuando la lengua internacional Esperanto sea conocida y hablada por la mayor parte de los hombres; cuando los maestros la enseñen en las escuelas, los profesores en las cátedras y los escritores en su obras; entonces será llegada la hora en que la lengua inventada por Zamenhof iluminará con sus benéficos rayos a toda la Humanidad, sirviendo, al igual que potente faro, de guía y norte para conducirnos al puerto tranquilo y seguro de la fraternidad universal; ella sola hará, en pro de la paz, más que todas las Conferencias y Sociedades de Naciones.

MIGUEL CARRERA, *Kuracisto*.

## GRAMATIKAĴOJ

### II

La subjekto, kiu ĉiam troviĝas en nominativo, estas persono aŭ aĵo pri kiu oni asertas aŭ neas ion: ekz.: Ludoviko estas kuracisto; la dianto estas bonodora. Ludoviko kaj dianto estas la subjektoj. Oni konas la subjekton per la respondo al la demando de *kiu* aŭ *kio* kune kun la verbo de la propozicio: ekz.: Kiu estas kuracisto? Ludoviko; li, do, estas la subjekto. Kio estas bonodora? la dianto; ĝi, do, estas la subjekto.

La predikato, kiu ĉiam troviĝas en nominativo, estas tio, kion oni asertas aŭ neas pri la subjeto: ekz.: La kardelo kantas; la reĝido fariĝis monaĥo; la luno estas bela. Kantas, bela kaj monaĥo estas la predikatoj.

Estas ankaŭ partoj de la propozicio la komplementoj, kiuj estas vorto aŭ aro da vortoj determinantaj nomon, aŭ verbon, aŭ kompletigantaj ilian sencon: ekz.: la folio de la arbo; la hundo mordis la katon. Oni dividas la komplementojn en komplemento de nomo, kaj komplemento de verbo. La komplemento de nomo povas esti *klariga* aŭ *specifiga*. La *klariga* komplemento eksplikas la signifon de la nomo, kaj oni povas ĝin forigi sen ŝanĝo de la senco de la propozicio: ekz.: Madrido, ĉefurbo de Hispanujo, havas belegajn palacojn. La *specifiga* komplemento precizigas la sencon de la nomo, limigante la amplekson de ĝia signifo, kaj ĝin forigante, oni ŝanĝas la sencon de la propozicio: ekz.: La studento laborema estas premiita.

La komplemento de verbo povas esti *rekta*, *nerekta*, kaj *cirkons-*

© Biblioteca Nacional de España

*tanca*. La rekta komplemento estas vorto aŭ aro da vortoj, kiujn rekte celas la ago de la transitivaj verboj: ekz.: La ŝuisto faras ŝuojn; la ĉasisto gaje rigardas, ke la ĉashundoj persekutas leporon. La *rekta* komplemento ĉiam estas en akuzativo, kaj oni konas ĝin, per la respondo al la demando Kio estas la objekto de la ago de la verbo?, aŭ ŝanĝante la propozicion de aktiva en pasivan formon, ĉar la subjekto de la pasiva formo estas la *rekta* komplemento de la aktiva: ekz.: Kolumbo malkovris Amerikon. Kion malkovris Kolumbo? Amerikon. Ameriko, do, estas la rekta komplemento. Ĝi estas ĉiam en akuzativo.

La *nerekta* komplemento, kiu ĉiam estas en dativo, signifas profiton, utilon, aŭ malutilon de la ago de la verbo, al kiu ĝi estas kunigata per la prepozicioj *al* aŭ *por*: ekz.: Mi laboras *por* mia patro; la infano skribas *al* sia amiko.

La *cirkonstanca* komplemento, kiu ĉiam troviĝas en ablativo, montras unu el la cirkonstancoj de la ago aŭ stato esprimata de la verbo; deveno, situacio, maniero, loko, tempo, kaŭzo, k. c.; kaj ĝenerale ĝi estas kunigata al la verbo per prepozicio: ekz.: La akvo venas de la fonto; en la Golfo de Lepanto la hispana armeo venkis la turkan; oni ŝvitas dum la somero; vintre neĝas en nia lando; mi studas matene, aŭ dum la mateno.

Subjekto estas vorto aŭ aro da vortoj pri kiu oni asertas aŭ neas ion: ekz.: La luno brilas sur la ĉielo; rajdi sur azeno plaĉas al la infanoj.

Subjekto de propozicio povas esti *nomo*: ekz.: Aŭtomovilo estas maŝino; Fiŝo naĝas en la maro; pasero kaj kokido pepas en la korto. *Adjektivo*: ek:. Mia kara estas juna dano; la unuaj antaŭiradis la standardon; la lastaj sekvis la ĉerkon. *Pronomo*: Mi studas esperanton; vi klarigas la malfacilaĵojn; ili parkere lernis la regulojn. *Verbo*: ekz.: *Kantas* estas verbo; *brili* apartenas al la suno; *furkuru* esprimas penson. *Participo*: ek.: *Mortanta* estas participo; *mortonta* diferencas de mortota; *benita* estas uzata por pasiva formo. Iu ajn parolparto: ekz.: *La* antaŭiras la nomon; *ol* estas komparilo; *kun* signifas akompanon; *ke* kuniĝas kun la adverbo malgraŭ; *ve* estas interjekcio. *Frazo*: ekz.: Danci sur estrado amuzas la najvulojn; loĝi apud marĉo estas malsane; *inter la arboj* estas frazo. *Plena propozicio*: ekz.: Ke vi mortigis la hundon estas riproĉinde; kiam foriros la vagonaro estis mia demando; ke la tero estas ronda ŝajnis nekredeble.

Predikato estas vorto, kiun oni asertas aŭ neas pri la subjekto: ekz.: Leono estas besto; la turo estas alta; la dianto sekiĝis.

SENTAŬGULO

(*Daurigota*).

© Biblioteca Nacional de España

# LITERATURO

## LA VERKO KAJ LA VERKINTO

Ĵus hispana ĵurnalisto intervjuis Remarque'n, kaj la klera aŭtoro de «En Okcidento nenio nova» faris al tiu deklarojn, kiuj estas indaj je komentario.

«Mi ne volas havi filojn. La homoj estas tro malbonaj—diris Remarque—; la vivo, tro peniga.» lomete konfuzigas nin la logiko de la novelisto, kiu tiel forte kortuŝis la civilizitan mondon per la kruela bato, senkompate sincera, de siaj majstraj paĝoj. Ni estus pensintaj, skribinte ilin—se ni posedus la kapablojn de Remarque—, ke estas necese naski filojn, kiuj transformu la malbonan mondon bona, kvankam por tio estu nepre fandi ĝin en la brulanta fandpoto de alia milito pli teruriga, sed malpli maljusta; ne okazigota de la malamo inter popoloj, en kies sino ĝemas la sklavoj sub la fera plando de la premantoj; ne disvolviĝonta inter homaj societoj entenantaj en iliaj internaĵoj la monstran kanceron de la maljusteco transformita leĝo, deklarita netuŝebla, altenigita al dogma rango, entronigita je la nomo de Dio, pri kies ekzistado tiu leĝo estus la plej potenca neniigilo...

Jes; havi filojn kun forta spirito, kun rigida volo, kun nepekebla konscienco; havi filojn, kiuj modelos malsaman mondon per la martelo de sia nova fido sur la amboso de la Naturo malavara, fruktodona, kiu ne scias pri kastoj.

Tiel opinii, kiel Remarque, estas sin montri egoistulo. La homo ne rajtas eviti la doloron, kiam ĉi tiu katenigas liajn similulojn.

Remarque, kiel Cervantes, faris pli, ol li celis fari. Grandega eraro pretendi, ke homo determinu la limon de siaj faroj, kiuj ofte estas pli superaj ol li, kaj kiuj, spirite, jam ne estas liaj.

Kolumbo nur konsciis Amerikon la orienta parto de Azio. Remarque pretendas esti verkinta nur fidelan priskribon de la militaj teruraĵoj; sed li faris multe pli: li aŭdigis gigantan krion de alarmo, kiu trafis ĉiujn terangulojn.

Eble okazus same pri liaj filoj: ke li naskus ilin por esti venkotoj kaj rezultus venkontoj.

Ju pli la germana verkisto parolas kun la hispana ĵurnalisto, tiu des pli malgrandiĝas. Per liaj paroloj, neniu kredus lin aŭtoro de altvalora verko. Rememorante ĉi tiun, ŝajnas ke, kvazaŭ per ensorĉo, ĝiaj paĝoj estus forprenintaj el la cerbo kaj el la koro de la verkisto ĉion, kion ĉi lastaj entenis.

© Biblioteca Nacional de España

La fina jeso estas senkonsoliga, kaj tiras nin kredi, ke, kiam homo naskas majstran verkon, li havas timon esti eklipsigata de ĝi, kaj ke li celas malgrandigi ĝian influon kaj senvalorigi ĝian tendencon.

(*Daurigota*).

* * *

## ĈIAMNOVA SENTO

Daŭre, daŭre pluvo falas,
daŭre falas sur la teron,
ĝin kovrante per mallumo
kaj per malvarmec' aeron.

En la dom' silento regas,
regas en la urb' silento;
sed en koro mia, rave
regas ĉiamnova sento.

Ĝi animon mian movis,
ĝi la cerbon ekbruigas,
ĝi, renaskiginte revon,
mian revon renaskigas.

Kaj ĝi puŝis miajn vortojn
el la koro ĝis la plumo,
kaj plenigis nigran ĉambron
per la bela, milda lumo.

Nokto ja fariĝis luma,
pluvo ja fariĝis bela;
estinteco malpli gaja
kaj la tag' venonta, hela.

Mi nescias ĉu la vojon
mian nigran ĝi lumigos
ĉu por ĉiam, ĉu longtempe,
ĉu momente ĝi stingigos.

Eĉ minute nur ĝi daŭrus
la influo super mi,
pro la lumo, pro la amo,
ĝin por ĉiam benu Di' !

A. N. D.

* * *

© Biblioteca Nacional de España

# JUNA PASTISTO

## RAKONTETO

Vojaĝantoj, trairante la kamparon, vidis junan paŝtisteton, kaj volante moki lian naivecon, demandis lin: Paŝtisteto? Kiel vi nomas vin? La paŝtisteto rapide respondis: Sroj, mi neniam nomas min, ĉar aliaj estas, kiuj min nomas. Iomete surprizite la vojaĝantoj, demandis denove la paŝtisteton: Kien iras ĉi tiu vojo? La paŝtisteto trankvile respondis la demandantojn: La vojoj neniam iras nek venas, ili ĉiam restas kvietaj kaj senmovaj.

La vojaĝantoj, vidante la lertecon de la juna paŝtisto, faris ankoraŭ trian demandon, kaj diris al la juna paŝtisteto: Atentu bone, se via patro ŝuldus al iu amiko ok pesetojn, kaj li pagus al li kvar pesetojn, Kiom da pesetoj ankoraŭ devus via patro al sia amiko?

La juna paŝtisto tuj kaj klare respondis al la demandantoj: Sroj, tial ke mia patro neniam pagis, nek pagas, kaj ankaŭ ne pagos la ŝuldojn, li ĉiam ŝuldus al sia amiko ok pesetojn anstataŭ kvar pesetojn.

La mokemuloj, vidinte ke la juna paŝtisto bone konis la aritmetikon kaj ankaŭ sian patron, ne demandis plu, kaj daŭrigis sian vojaĝon, laŭdante la lertecon de la juna kaj ne trompebla paŝtisteto.

NAIVULO

# MANIERO POR DETRUI SOCIETON

Jen dek manieroj por detrui societon:

1.ª Ne ĉeesti la kunvenojn.

2.º Alveni malfrue.

3.ª Se la vetero estas malbona, ne iri.

4.º Kiam oni iras, mallaŭdi ĉiam la laboron de la komitatanoj.

5.ª Ne akcepti komitatajn oficojn, ĉar pli facile estas kritiki ol solvi la aferojn kaj labori por la ĝenerala bono.

6.º Kiam oni ne estas elektata por ia komisio, ĉagreniĝi, kaj se oni estas elektata ne helpi ilian laboron al la ceteraj elektitoj.

7.º Kiam la Prezidanto petas opinion pri ia grava afero, respondi ke oni havas nenion por diri.

8.ª Fari nur tion kio estas tute nepra. Sed se alia membro estas

© Biblioteca Nacional de España

preta labori propramove, tiam diri krie ke asocio estas regata de kontraŭregulaj ordonisdoj.

9.° La kotizaĵojn pagi malfrue, aŭ ne pagi, kaŭzante malprofiton al ceteraj.

10. Ne priokupi pri varbado de novaj membroj; lasi ke aliuloj faros tion, kaj esti mallaborema.

(Angle verkita de Edward G. W. Williams).

Karaj samasocianoj; Vi ĵus legis la manierojn detrui societon. Agu ni tute kontraŭe pri H. E. A. kaj ni plifortigos nian asocion.

Tute via.

FERNANDO REDONDO

## CRONICA INTERIOR

### BARCELONA

Antaŭ kelkaj semajnoj fondiĝis en Barcelono la «Zamenhof-Instituto», per kiu oni celas efikan disvastigon de Esperanto kaj ĝia interna ideo, kaj ke ili deziras sekvi la konsilojn kaj orientigojn de D-ro. Zamenhof, je la servo de interhoma frateco, per internacia lingvo.

Ĉefaj eroj el la programo de la dirita Societo estas:

1-e. Atingo per ĉiuj decaj rimedoj, ke Esperanto estu ĝenerale akceptata en la tuta mondo, kiel neŭtrala helpa lingvo.

2-e. Atingi laŭeble de la esperantistaro, ke malgraŭ diversa pensmaniero de ĉiu, sur la neŭtrala lingva fundamento efektiviĝu interhoma respekto kaj toleremo, kio permesos realigi la *internan ideon* de Esperanto, konsistanta je tio, ke la *nova sento* de *paco kaj amo* regu la mondon.

3-e. Atingi, kiel eble plej, la plifortiĝon kaj disvolviĝon de la Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.), kiel la plej taŭga universala kaj neŭtrala organizaĵo porpraktika.

La Komitato konsistas el: Prezidanto, Anĝelo Valdepeñas (iama Prezidanto de K. E. F. kaj de la grupo «Barcelona Stelo»; Vic-Prezidanto, Francisko Gorgues (eks-Delegito de U. E. A.); Sekretario, Jozefo Anglada; Vic-Sekretario, Francisko Vilá; Kasisto, Johano Campdelacreu; Kalkulisto, Emanuelo Corredó; Bibliotekisto, Jozefo López; kaj Voĉdonantino, Sara Ullastres.

© Biblioteca Nacional de España

La Instituto, kies provizora Centra Oficejo estas ĉe la Sekretario, strato Sitjas, 8, 3.°, starigis informservon ĉiulabortage de la 7 1/2 ĝis la 8 1/2 vespere, realigas efikan propagandon per la ĉiutaga ĵurnalaro kaj disvolvas per korespondado sukcesan kurson de Esperanto.

* * *

La Akademio Enciklopedia Esperanto (Galileo, 40, Sans, Barcelono) malfermis kurson de Esperanto. Ĝi estas bona sukceso, ĉar multaj lernantoj partoprenas.

Ankaŭ la «Academia Enciclopédica Espero» (Montaña, 62, S. M., Barcelono) malfermis kursojn pri Geografio, Aritmetiko kaj Esperanto. Oni konfidas, ke la Esperanto-kurso finos sukcese, same kial la antaŭaj.

La 22an de Marto kunvenis la H. E. A.-ANOJ el Barcelono por interŝanĝi opiniojn rilate al la bona disvolviĝo de nia tutlanda Asocio.

* * *

## FUENTES DE NAVA

Toca a su fin un curso, dirigido por el médico don Miguel Carreras, Vocal de la Directiva de H. E. A.; muy pronto se verificarán los exámenes para obtener el diploma correspondiente que otorga nuestro Instituto.

* * *

## JAEN

El curso dirgido por el infatigable médico don Eduardo Arroyo, ha aumentado en entusiasmo y número, de tal modo que muy pronto quedará allí formado un importante grupo que sumar a las falanges esperantistas andaluzas.

* * *

## LOGROÑO

Se ha inaugurado un curso bajo la dirección del entusiasta samideano, médico, don Julián Loyola.

* * *

© Biblioteca Nacional de España

## MADRID

Cuatro nuevos cursos se están desarrollando en Madrid: uno en el Puente de Vallecas, con quince alumnos, dirigido por el pintor don Julián Fernández; otro en «Los Exploradores de España», explicado por el Jefe de Correos don Pedro Gil Arrúe; otro en la plaza del Dos de Mayo, explicado por nuestro entusiasta samideano don Florencio Barandiarán, y otro en el domicilio particular del Secretario de H. E. A., don Mariano Mojado, quien, además, continúa los cursos por correo.

* * *

## SANTANDER

En el Ateneo Popular ha quedado abierto un nuevo curso, reinando entre los *lernantoj* mucho entusiasmo.

* * *

## ZARAGOZA

Bajo la dirección de don José Carnicer ha empezado un nuevo curso en «Zaragoza Esperantista».

# CRONICA EXTERIOR

## ANTAŬKONGRESO 1931 - BERLIN

Multaj gesamideanoj certe rememoros la sukcesajn aranĝojn en Berlin antaŭ la Danzig-a kongreso.

La «*Esperanto Gruparo - Berlin*» ĵus decidis same bonan antaŭkongreson okazigi antaŭ la Krakov-a kongreso 1931. «Internacia Centra Komitato» jam donis sian oficialan aprobon kaj la Germana Esperanto-Asocio promesis, subteni ĝin.

Ĉar la Krakov-a Kongreso verŝajne okupos la unuan semajnon de aŭgusto 1931, la Berlin-a antaŭkongreso do okazos dum la lastaj tagoj de julio 1931, tiel ke la partoprenintoj povos bone veturi de Berlin al Krakov-o, trapasante dum tiuj ĉi tagoj Berlin-on kaj haltante tie.

© Biblioteca Nacional de España

Ĝis nun la jenaj faktaj informoj povas esti donataj. La antaŭkongresa komitato konsistas el prezidanto: s-ro. dir. J. Glück,
ĉef-sekretario: s-ro. Ernst Wichert,
sekretariino: f-ino. Ruth Sandelwitz,
kasisto: Eckhardt Lindemann, Berlin W 8,
Französische Str. 9 - 12.
komitatanoj: sroj. Emil Dauge, Max Haase.

La konstanta adreso por ĉiaj monsendoj estos tiu de la kasisto (vidu supre).

La kotizaĵo estos M 3- germanaj. Ni kore petas jam nun provizore anonci la partoprenon kaj sendi la kotizaĵon al la supre nomita kasisto. Adreso por monsendoj estas: Berlin poŝtĉeka konto 42465, Eckhardt Lindemann, Berlin W 8, Französische Str. 9 - 12.

Aliajn monsubtenoj (speciale por blindaj gesamideanoj) ni kun granda danko akceptos. La provizora programo estos:

I^a tago: posttagmeze: alveno de la partoprenantoj, gvidado al la loĝejoj; vespere amika kunveno en kafejo Friediger, Postdam-a placo.

II^a tago: antaŭtagmeze grupaj gvidadoj tra la urbcentro, rigardado de historiaj vidindaĵoj kaj de la nova Pergamon Muzeo. Posttagmeze vizito de la Flughaveno. Vespere senĝena vespermanĝo kun gajaj kantoj, deklamoj kaj dancado.

III^a tago: antaŭtagmeze vizito al la granda magazeno «Wertheim» (laŭspecialaj deziroj gvidado tra aliaj modernaj institutoj, ekz. por kuracistoj tra la «Virchow-malsanulejo). Posttagmeze vizito al la nova gazetpresejo de Mosse. Vespere oficiala salutvespero en granda salonego de la urbdomo.

Pri nemultekostaj loĝejoj (hoteloj ktp.) ni zorgos kun oficiala helpo de la «Oficejo por fremdultrafiko, ekzpozicioj kaj foiroj».

Ni povas promesi, he ĉio funkcios bone, ke la elspezoj ne estos grandaj kaj ke ĉiu partoprenonto estos kontenta. Aliĝu jam nun kaj

VENU BERLINON

*La Antaŭkongresa Komitato.*

* * *

## PLACO ZAMENHOF EN BOULOGNE-SUR-MER

En Boulogne-sur-Mer, urbo de l'Unua Kongreso, la urba Konsilantaro, laŭ la peto de la Grupo Esperantista, decidis doni al unu placo de la urbo la nomon de L. L. ZAMENHOF.

© Biblioteca Nacional de España

La inaŭguro okazos la 26-an de julio, dum la regiona Kongreso de la Norda Federacio.

Ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu sendi gratulan kaj dankan leteron: unue al la Urbestro, due al la Kompanio de Nordaj Fervojoj, al kiu apartenas la placo, kaj kiu apogis varme la proponon.

Jen la adresoj: M. le Maire de Boulogne-sur-Mer.

M. l'Ingénieur en chef de l'exploitation des chemins de fer du Nord, a Boulogne-sur-Mer.—E. DELIGNY, Prezidanto de la Federacio. Delegito de U. E. A., 4, Rue Allent, St-Omer (P.-de-C.).

* * *

## RECENZEJO

«*Preparantoj de Milito*», estas broŝuro 15×22 1/2 cm., el 72 paĝoj, eldonita de CKSEU (Spiridonovka, 15. Moskvo). Tre interesa teksto pri «akuza konkludo en la proceso de Industria-Partio formita de inĝenieroj, teknikuloj, k. t. p., en rilatoj kun rusaj generaloj kaj kapitalistoj elmigrintaj kaj kun eŭropaj Registaroj kaj Staboj por malsukcesigi komerce, industrie, trafike, agrikulture, la kvinjarplanon, naski gravan krizon kaj malkontenton, faciligi intervenon, kaj ĉiel frakasi, renversi USSR'n. Iuj negravaj eraroj, sendube kaŭze de ne bona atento je la korektado de presprovoj, makulas la bonan stilon de la enhavo, ekzemple: «spite al», «tio, kiu», «aro de», «neniam de neniu», anstataŭ *spite de*; *tio, kio*; *aro da* aŭ *aro el*; *neniam de iu*. Nur estas bedaŭrinda la uzo de vortoj ne necesaj, kiuj ne aperas eĉ en «Plena Vortaro de Esperanto» kaj kiuj ĝenerale estas tute hispanaj: *intervenco* (anstataŭ *interveno*), *direktivo*, *avansigi*, *eksponi* (uzata neĝuste, *elmontri*, k. c.), *limitrofaj*, *dominanta*, *plasoj*, *desanton*, *helmo* (ŝtalhelmo anstataŭ *ŝtalkasko* (?)), *konjunkturon*, *rekogneska*, *asortiteco*, *asortaĵo*, *krekingo*, *rajonoj*, *asortado*, *resurso*, *nelegala*.

© Biblioteca Nacional de España